La Tago De Homaj Rajtoj 2013

Mesaĝo De La Ĝenerala Sekretario Okaze De La Tago De Homaj Rajtoj, 10 Decembro 2013

La Tago de Homaj Rajtoj markas la datrevenon de la akcepto de la Ĝenerala Asembleo de la vojmontra Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La ĉi-jara festado ankaŭ markas 20 jarojn depost kuraĝa antaŭenpaŝo en la lukto por realigi rajtojn por ĉiuj homoj, nome la akcepto, fare de la Monda Konferenco pri Homaj Rajtoj, de la Viena Deklaro kaj Agadprogramo. Profitante el partopreno de pli ol 800 neregistaraj organizaĵoj, naciaj institucioj, traktataj instancoj kaj universitatanoj, Membraj Ŝtatoj akceptis longperspektivan vizion, inkluzive kreon de Oficejo de la Alta Komisionestro por Homaj Rajtoj (OAKHR) – tiel realigante unu el la longe sopirataj revoj de la internacia komunumo.

Dum la jardudeko de la ekzisto de OAKHR, kvin sindonaj Altaj Komisionestroj inspire gvidis la laboron de Unuiĝintaj Nacioj por tutmonde antaŭenigi la homajn rajtojn. Per vasta gamo de normoj kaj mekanismoj, OAKHR pledas por viktimoj, premas la Ŝtatojn plenumi siajn devojn, subtenas homrajtajn specialistojn kaj instancojn, kaj – per sia ĉeesto en 61 landoj – helpas la Ŝtatojn evoluigi siajn homrajtajn kapablojn.
Prosperigi la homajn rajtojn estas unu el la kernaj funkcioj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Organizaĵo sekvis tiun celon ekde sia fondiĝo. Tiam kaj nun, la ŝlosilo al sukceso estas la politika volforto de la Membraj Ŝtatoj. Apartenas unuavice al la Ŝtatoj la devo protekti homajn rajtojn kaj preventi malobservojn je la nacia nivelo, kaj ankaŭ rezisti kiam aliaj Ŝtatoj malatentas siajn sindevigojn. Tio ne ĉiam facilas: tra la pasintaj 20 jaroj okazis genocidoj kaj multaj aliaj ŝokaj kaj grandskalaj atencoj kontraŭ internaciaj homaj rajtoj kaj humaneca juro.

Je la koro de nova iniciato, nome la Agadplano “Rajtoj Unuavice”, kuŝas plibonigo de la maniero laŭ kiu la UN-sistemo preventas kaj respondas al katastrofminacoj. La Plano celas certigi, ke la UN-sistemo kaj ĉiuj stabanoj rekonu la centran lokon de homaj rajtoj en la kolektivaj respondecoj de la Organizaĵo. Ĉefe, ĝi celas fortigi niajn respondojn al larĝaj malobservoj, kaj malhelpi, ke tiaj situacioj eĉ okazu – tion farante per emfazo je fruaj avertoj kaj agadoj bazitaj je homaj rajtoj.

Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, mi vokas al Ŝtatoj, ke ili plenumu la promesojn, kiujn ili faris ĉe la Viena Konferenco. Mi ree asertas la sindevigon de la Sekretariato de UN kaj ties fondusoj kaj programoj al vigla atento kaj kuraĝo fronte al homrajtaj malobservoj. Kaj fine, mi omaĝas al unu el la grandaj simboloj de homaj rajtoj en nia epoko: Nelson Mandela, kies forpaso trempis la mondon en aflikton, sed kies tutviva sindediĉo al homa digno, egaleco, justeco kaj kompato restos porĉiame nia inspiro dum ni plue strebos krei mondon kie ĉiuj homrajtoj ĝueblas de ĉiuj homoj.

Ban Ki-moon
(*Tradukita de Humphrey Tonkin*)

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041